Universala Esperanto-Asocio

# KONGRESAJ MEMOROJ

Estrara Subteamo: MOVADO

*Estrara Komuniko EKO 2016-24 sendita el Budapeŝto, la 21an de aŭgusto.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

## Kongresaj filmoj

Jen ligo al filmeto pri ĉi-jara UK en Nitra, farita de SO Jinsu el Koreio, la sekvajara UK-lando:

https://www.youtube.com/watch?v=4miBJI69OuE&feature=youtu.be

Sendis:SO Gilsu

Ne ĉiujn programerojn en la UK eblis partopreni, ĉar okazis pluraj samtempe, sed kelkajn vi povas plene spekti eĉ post la kongreso. 15 programeroj okazintaj en salono Hodler, interalie kunsidoj de la Komitato de UEA, prelegoj kaj koncertoj, estas spekteblaj ĉe:

https://archive.tp.cvtisr.sk/archive.php?tag=esperanto

Sendis: Dorota Rodzianko

## Kongresaj podkastoj

La podkasta teamo de <movada vid-punkto> pretigis imponan serion da son-intervjuoj kun movadaj aktivuloj kadre de la Kongreso..

**MvP001-Preparoj por UK 101** (registrita en januaro 2016)

https://movada-vid.punkto.info/2016/01/16/mvp001-preparoj-por-uk101/

Gastoj: Peter Baláž, Ján Vajs; 45 min.

**MvP003- Parolado pri UEA 2016**

https://movada-vid.punkto.info/2016/07/25/mvp003-parolado-pri-uea-2016/

Gastoj: Mark Fettes, Martin Schäffer; 50 min.



Intervjuitoj Mark Fettes kaj Martin Schäffer videblas en sceno el la postkongresa estrarkunsido de UEA. Fotis: Attila Kaszas.

**MvP004-Esperanto instruado**

https://movada-vid.punkto.info/2016/07/25/mvp004-esperanto-instruado/

Gastoj: Mireille Grosjean, Katalin Kováts; 1 horo 10 min

**MvP005-Faka agado**

https://movada-vid.punkto.info/2016/07/27/mvp005-faka-agado/

Gasto: José Antonio Vergara; 1 horo 32 min

**MvP006-Lingva justeco**

https://movada-vid.punkto.info/2016/07/28/mvp006-lingva-justeco/

Gastoj: Javier Alcalde, Bengt-Arne Wickström; 1 horo 46 min

**MvP007-UK 102 en Seulo**

https://movada-vid.punkto.info/2016/07/28/mvp007-uk102-en-seulo/

Gastoj: So Jinsu, Ho Song; 57 min

**MvP008-Esperanta kulturo**

https://movada-vid.punkto.info/2016/07/31/mvp008-esperanta-kulturo/

Gastoj: Anna Löwenstein, Chuck Smith; 1 horo 33 min

**MvP009-Resumo pri UK 101**

https://movada-vid.punkto.info/2016/08/04/mvp009-resumo-pri-uk101/

Gasto: Alois Eder; 1 horo 57 min

Krome ni ankaŭ regule registras podkaston pri neesperantaj temoj https://kern.punkto.info/

## Kontaktinformoj por Movada-vid.punkto

Reteja adreso https://movada-vid.punkto.info

retpoŝto: kontakto@movada-vid.punkto.info

Raportis: Johannes, Julia kaj Eva




Eksterenrigarda kongreso: publika manifestacio tra la ĉefstrato de Nitra survoje al la Internacia Vespero. Foto:smg

**Jen la unua el serio de orientigaj tekstoj pri nia Asocio**

VOJOTROV

# Kelkaj komunikaj ebloj de kaj pri UEA

## Informoj pri UEA

La oficiala fonto de informoj pri la Universala Esperanto-Asocio estas ĝia retejo: www.uea.org

Tie la kategorioj je eniro estas: **UEA** (enkonduka prezento), **Aktuale** (novaĵoj el la Asocia vivo), **Asocio** (ĉefaj organoj kaj strukturoj), **Strategio** (la nune valida plano), **Landoj** (informoj pri la sepdeko da landaj asocioj de UEA), **Fakoj** (informoj pri la fakaj asocioj), **TEJO** (junulara agado), **TEKO** (gravaj dokumentoj kaj financaj raportoj, i.a. por komitatanoj).

Pliaj paĝoj permesas retan aliĝadon al UEA aŭ la kongresoj, prezentas informojn pri Universalaj Kongresoj, pri la Delegitaro, la asociaj revuoj kaj la libroserva katalogo.

## Libere alireblaj informejoj, diskutejoj

Populara estas la paĝo de UEA en Facebook:

https://www.facebook.com/Universala.Esperanto.Asocio.

5.647 homoj ŝatis la paĝon, al ĝi alvenas multaj reagoj, komentoj kaj fotoj.

UEA havas vaste alireblan grupon en Facebook kun momente 735 grupmembroj:

https://www.facebook.com/groups/Universala.Esperanto.Asocio;

Tie oni ne postulas membrecon al UEA. Tiu grupo estas por membroj individuaj, aligitaj kaj simpatiantoj de UEA. Al tiu grupo eblas alsendi ne nur tekstajn mesaĝojn (laŭeble mallongajn sed trafajn), sed ankaŭ fotojn kaj foto-albumojn – prefere kun bildklarigoj. Mesaĝoj devas rilati al la agadoj aŭ celoj de la Asocio. Nun ĉiu alsendata mesaĝo devas esti aprobita de administrantoj, vidu ĉe:

https://www.facebook.com/groups/Universala.Esperanto.Asocio/admins

## Diskutejo por individuaj membroj de UEA

Por disponigi liberan forumon al niaj individuaj membroj, sendepende de la estraro, ekzistas retpoŝta listo. La sekva adreso prezentas la regularon por la grupo:

https://groups.yahoo.com/neo/groups/uea-membroj/info,

La grupmembroj mem elektas prizorgantojn por la listo. Klaku la (devige anglalingvan) butonon <+ **Join Group>**, por peti aliĝon al la grupo, laŭeble citante vian uea-kodon. Ĉiam eblas malaliĝi pere de sekvo de ligo sube de ĉiu grupa mesaĝo. La grupo momente havas 284 membrojn.

## Estonto

Aktivaj diskutoj en la Asocio rilatas al pretigo de novaj laŭtemaj forumaj eblecoj por diskutigi la membrojn kaj aliajn. Diversaj organoj de la Asocio havas siajn proprajn diskutejojn, ekz. la komatatanoj, konsilianoj kaj agantoj pri informado.

============================ **Vortoj: 550**

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado_kun_LA,_FA...

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eks-membroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson landon, kaj (se eble) la grupo aŭ kialo por via ĉeesto en la ekspedolistoj.